

La Raporto pri Niaj Asociaj Laboroj kontraŭ la Epidemio

1. Kuraĝi kaj Subteni Membranojn de Nia Asocio kontraŭ la Epidemio

En januaro de 2020, la komenca periodo de la epidemia paroksismiĝo en Ĉinio, fronte al la epidemio, nia asocio aktive kaj ĝusttempe faris kaj faras multajn propagandajn kaj kuraĝigajn laborojn kontraŭ tiu epidemio.

Ni daŭre utiligis ret-grupojn de nia komitato, dissendante aktivajn kaj pozitiv-energiajn informojn kaj ideojn por kuraĝi kaj asisti niajn membrojn en fronta linio de la batalo kontraŭ la epidemio. Nia asocio oficiale komponis la " Alvoko por kontraŭ la epidemio " kaj publikigis ĝin en la ret-stacio de ĈEL.

Multaj membroj de nia asocio forlasis feriojn kaj aktive alvenis kurac-postenojn ,rekte klopodane en la batalaj linioj kontraŭ la epidemio, kie ili akceptis kaj kuracis konfirmitajn malsanulojn, kie ili eble suferas pli multajn riskojn de infektiĝoj de tiu viruso.

La aliaj membroj ĵetis sin al servadoj de frontaj linioj de la batalo.

Kiam oni demandis ĉu vi timas la viruson kaj la malsanon, ili respondis ke sinceredire ĉiuj homoj timas, tamen fari tiel estas la devo kaj respondeco por ĉiu medicinisto.

Ili estas bonaj medicinistoj kaj ankaŭ bonaj medicin-esperantistoj, kiuj enkorpigas sin mem en la spirito de E-o, sindoneco.

Inter tiuj medicinistoj , iuj profesiis en la nomumita hospitalo de la epidemi-malsano kiel medicinistoj, aliaj profesiis en la febr-kliniko kiel farmaciistoj kaj la ceteraj klopodis en la febr-kliniko kiel doktoroj.

Kankam ili ne veturis al Wuhan, la plej danĝera kaj malfacila epidemi-zono, tamen ili dediĉis iliajn penadojn al kontraŭ la epidemio.

Krom ili, multaj medicinistoj en nia asocio faris multajn laborojn por nerekte subteni la batalojn kontraŭ la epidemio. Ili ankaŭ estas batalistoj.

Pri iliaj bonaj laboroj kaj dediĉoj " China Radio International " raportis kaj laŭdis.

(Kunsulti : <http://esperanto.cri.cn/2521/2020/02/27/162s209489.htm>)

2. Aktuale Raporti la Epidemiajn Situaciojn al UMEA

En januaro de 2020, la komenca periodo de la epidemia paroksismiĝo, mi ĝusttempe kolektis koncernajn informojn pri KOVIM 19 kaj 2019-nCoV por niaj kolegoj en UMEA **antaŭtempe koni ilin kaj pretigi preventadojn kaj kuracadojn kontraŭ ili.**

Mi skribis kelkajn artikolojn kaj volis objektivite raporti al UMEA realajn situaciojn pri la epidemiaj fortecoj, influoj kaj ĝiaj evoluoj, speciale ĝiaj epidemiaj ecoj, karakteroj kaj bazaj prevent-metodoj kontraŭ ĝi por fari niajn kolegojn koni reale ,taksi objektivite efik-rezultojn kaj plue esplori ilin.

Sekvante la epidemiajn evoluojn, mi zorgeme kolektis la kuracajn metodojn kun iliaj efikoj , kaj kolektis la kontraŭepidemiajn rimedojn de niaj divers-rangaj registaroj kun iliaj rezultoj por raporti al UMEA, por niaj kolegoj antaŭtempe koni ilin kaj pretigi preventadojn kaj kuracadojn kontraŭ ili , se la epidemio aperos al ili .

Ĉar ni mem jam suferis tiajn mizerojn de la epidemio, niaj kolegoj en fremdlandoj havu sufiĉajn tempojn pretigi preventadojn kaj kuracadojn kontraŭ ili!

Mi pagis multe da tempoj, ĉasante la epidemiajn diversajn informojn, kolektante kaj analizante ilin, kaj samtempe kolektante efikajn prevent-rimedojn de divers-rangaj registaroj por konkrete konigi al niaj kolegoj la sukcesajn rimedojn por preventi la epidemion .

Mi speciale sekvis la noviĝojn de la protokoloj de Ĉina Komitato pri Sano (TĈM), kiuj resumiĝis el la sukcesaj kaj aktualaj spertoj de la medicin-specialistoj de Ĉinio kaj reprezentis la plej altajn nivelojn kontraŭ la epidemio en Ĉinio. Mi ĝusttempe tradukis la koncernajn partojn de ili en E-o kaj transsendis al UMEA por kune ĝui kaj plue esplori.

Ĝis nun la artikoloj eble posedas la referencecojn por nunaj epidemi-situacioj en Eŭropo.

Ekde la komenco, ni kredis ke la epidemio havas ne limojn kaj miaj amikecoj, simpatioj, interhelpoj kaj kunlaboroj estu trans limoj !

Ekde la komenco ĝis nun ni praktikis miajn kredojn !

Dum tiu proceso, ni dankas al la prezidanto de UMEA, doktoro Christoph Klawe, kiu pagis multe da tempojn por interkomunikiĝi kun ni, simpatii al ni, helpi nin kaj la tutan asocion. Pri tio " China Radio International " intervjuis kaj raportis.

(konsulti: <http://esperanto.cri.cn/2521/2020/02/27/162s209489.htm>)

Krome nia asocio iam planis donaci la kontraŭepidemiajn materialojn al la plej malfacila epidemi-zono en la komenco, tamen tiam ni povis nenie aĉeti la ordinarajn maskojn ktp. en Ĉinio kaj malsukcese petis iujn helpi nin!

Hodiaŭ mi ankaŭ diskutis la donacojn de la masko al Belgio kun la estroj de nia asocio kaj ni klopodis por enketi konkretajn procesojn, tamen ni akiris tiajn informojn : ni nun povas aĉeti la ordinarajn maskojn en Ĉinio (ĉar nun la epidemio baze subpremiĝas kaj la masko ne plue bezoniĝas multe) , tamen ni povas ankoraŭ ne aĉeti la maskojn kun la kvalit-permeso eksportebla al Eŭropo, ĉar ili estas eksportataj al Eŭropo kaj aliaj landoj ktp. de grandaj kompanioj ktp..

Mia ĉina amikino vivas en Belgio kaj ŝi volas nin donaci tiujn al iuj hospitaloj en belgio. Sed ni ree malsukcesas. La afero ne sukcesas ,tamen niaj kredecoj ne subiĝas.

Ĉina Medicina Esperanta Asocio

Wang disheng

2020-3-30